Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 2004 — MENSUEL/MONATA — 75-a jaro, n-ro 1 (1183)

ISSN 1163.0442 — 5 €

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

Mensuel

Numero 0 — Espéranto : vers une culture sociale sans frontières — Oktobro 2003

MONDIĜO
KAJ SOCIA MOVADO

3° FÓRUM SOC
ESPERANTO

FALE ESPERAN
LINGUA T SNAC
DE CULT UNIV

Zone euro : 3,30 € / Suisse : 5 F.S. / Autres pays : 4,10 €

Memori kaj neniam forgesi » p 7
Une autre communication est possible » p 8
Cu la librostoko de SAT estas kaduka ? » p 10
Laissons les Saxons... en Saxe ! » p 11
Les saigneurs de la guerre » p 12
Pri artikoloj kaj aliaj majuskloj » p 13
Esperanto kaj aliaj lingvoj » p 14
59a kongreso de SAT-amikaro » p 16

La organo de nia fratorganizo "SAT-Amikaro" ŝanĝis la nomon kaj aspekton.

Ĝi nomiĝas "La SAGO" (SatAmikara GazetO).

Longan vivon kaj sukceson al "La SAGO"

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj,,
vi tenas en la manoj la unuan numeron de la serio 2004. Mi esperas ke vi trovos en ĝi interesajn kaj instruajn artikolojn. Por ke ĝi estu ankoraŭ pli interesa, plian fojon mi invitas vin al kunlaboro. Sendu al la redakcio viajn artikolojn.
Ĉi-foje la kotiztabelo aperas malfrue, nur en tiu ĉi numero, kaj pro kio preskaŭ neniu el vi jam pagis la kotizon 2004. Vi povas konstati ke la kotizoj restis senŝanĝaj, kiel lastjare, sed la Asocio bezonas tiun monon por povi normale funkcii. Do pro tio, ne atendu sed pagu tuj. Samtempe vi povas sendi vian kongresaliĝon, ĉar la plej favora periodo finiĝas fine de januaro.
Esperante ke tiuj miaj kelkaj vortoj ne estos vanaj kaj senrezultaj, mi sincere salutas vin ĉiujn.
Via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.



JARKONFERENCO 2004 DE SATEB
16-18.05.2004
ĉe Barlaston vilaĝo

Kreŝimir Barkoviĉ, Ĝenerala sekretario de la SAT-PK, estos nia gastpreleganto en 2004. Li gajnis "OSIEK-Premion 2002" pro sia tradukaĵo de "7000 tagoj en Siberio" - la temo de unu el liaj du prelegoj. La alia estos "Tri semajnoj en Japanio - sur la spuroj de Lanti".
Por pli bone povi partopreni la diskuton, bonvolu antaŭe legi la libron. La semajnferio estos varia kaj stimula.
Por pliaj detaloj kaj aliĝilo, kontaktu:
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs, ST12 9DG
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278 rete: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk
Se vi ne bone regas la anglan, kontaktu Anne aŭ Ron (vidu ĉi-sube. Ili estas esperantistoj).

Paralele estos Esperanto-Konversacia grupo por komencantoj - gvidata en la angla. Por pliaj informoj, nur pri tio, kontaktu:
Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ, Britio, rete: a.johnson@amserve.net
aŭ Ron Lynn, rete: ronsnafulin@aol.com.
Al unu reprezentanto de ĉiu SAT-LEA-o, SATEB ofertas senpagan restadon nur dum la semajnfino. Pri tio kontaktu Anne aŭ Ron kiel supre.

KOREKTO
Nia kamarado Marteno Bustin atentigas, ke li mem ne estas aŭtoro de la artikolo "Denove la religio" aperinta en novembra Sennaciulo, sed ke li tradukis ĝin el la hispana anarkosindikatista ĵurnalo CNT.
La redakcio

PAGU VIAN SAT-KOTIZON 2004 !
KOTIZTABELO - EN LA LASTA PAĜO

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (ĉ = ĉ, ŝ=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

Novjara mesaĝo de la prezidanto de la P.K. de SAT



Karaj gekamaradoj,

unue mi volas deziri al vi, ĉion bonan por la jaro 2004. Sanon kaj feliĉon por vi kaj viaj familianoj kaj amikoj, kaj kuraĝon en viaj bataloj kiuj celas pli socialan kaj humanan mondon.

Antaŭ 125 jaroj naskiĝis en la Franca vilaĝo Néhou, Eugène, Aristide, Alfred Adam. Poste li famiĝos sub la nomo Eŭgeno Lanti, unu el la ĉeffondintoj de nia asocio SAT (el Vivo de Lanti, E.Borsboom).

Tiuj, kiuj konas la historion de lia vivo scias, ke unu aferon Lanti certe neniam volis, kaj tio estas ke homoj ornamu lin per gloro kaj metu lin en lumĵetilon. Plej granda respekto kiun ni povas fari por "festi" la rememoron de la naskiĝtago de Lanti, estas silenti pri la homo, kaj mi faras tion.

Tamen la ideoj de ĉi tiu genia persono iĝis vole ne vole posedaĵo de grandega grupo da homoj kiuj dum la lastaj 83 jaroj aktivis en SAT. Homoj kiuj batalis por ke el la mondo malaperu maljusto, subpremo kaj malegaleco. Homoj kiuj konscie vivas kaj kiuj sopiras al egalrajto por ĉiuj homoj el la tuta mondo.

Kun siaj kompanoj de la unua horo Lanti kreis asocion kiu estis tiel avangarda ke eĉ nun, precipe reakciuloj, ne kapablas kompreni la celojn de nia asocio.

Malgraŭ la multaj tekstoj kiujn Lanti postlasis, en kiuj li klare klarigis "Kio estas SAT", eĉ nun homoj ne komprenas, ke SAT ne estas Esperanto-asocio. SAT estas NRO kies celo estas eduki homojn, subteni ilin en ilia batalo kontraŭ maljusto, helpi ilin kompreni ke dogmoj ne alportas feliĉon, sed male katenigas homojn, subpremas ilin serve al tiu, kiu estas la plej granda malamiko de la salajruloj, de la laboranta klaso, nome la liberala kapitalismo.

SAT ne estas asocio kiu postkuras politikajn partiojn aŭ politikistojn, sed asocio kiu havas propran gvidlinion. Ĉi tiun informon oni tre facile povas trovi en malgrandega libreto, nur 28 paĝa, la statuto de SAT. Jes vi pravas, por kompreni ĝin oni devas esti sufiĉe sperta uzanto de la laborlingvo uzata de SAT, la universala lingvo Esperanto.

Esperanto fakte estas unu el la simboloj de SAT. Per uzado de Esperanto, SAT montras ke ĝi ne lasas sin katenigi, eĉ de la plej grandaj mondaj fortoj.

Lingva rajto estas parto de homa rajto, estas signifa parto de klasbatalo. SAT ne ligas lingvon al iu kulturo aŭ lando. SAT ankaŭ ne pensas en limigoj de landlimoj, sed estas sendependa de iu ajn nacio, sendependa de iu ajn nacia lingvo, sendependa de iu ajn premgrupo, politika partio aŭ dogmo.

SAT fosas sian propran sulkon. Tio ne signifas ke ni estu indiferentaj al la laboro de aliaj asocioj kiuj celas la samon kiel ni. Ni ankaŭ volas kunlabori kun ili, kiam ili respektas nian sendependecon.

Kion ni devas fari honore al nia k-do Lanti? Mi ne volas doni al vi konsilojn, sed mi povas diri kion mi klopodas fari: Agadi laŭ la idearo de Lanti kiu laŭ mia opinio estas konstate serĉi la veron, kompari miajn ideojn kun aliaj. Ne fali en kaptilon de grupoj kiuj disvastigas dogmojn kaj mensogojn.

Mi ankaŭ volas fari ĉion por konvinki aliajn aliĝi al SAT, ĉar ju pli da homoj, des pli da ideoj. Kompari ideojn estas grava, sed ankaŭ elekti kaj prijuĝi la ideojn de aliaj estas tre grava.

Mi volas alvoki vin al plej larĝa formo de toleremo, sed samtempe volas atentigi vin; toleremo devas halti je la ĝusta flanko de la gaskamero. Per ĝi mi volas diri ke demagogojn kiuj propagandas disigon de laboristoj pro koloro aŭ deveno, kiuj klopodas malpermesi liberan eniron en landoj aŭ kontinentoj, rasistojn kaj ksenofobojn, ni ekde la unua momento malfidu kaj kontraŭbatalu.

Ni ĉiuj devas havi la rajton vivi en paco, Ni devas fari ĉion por kompreni la problemojn de aliaj, subteni la malfortojn kaj atentigi la profitemulojn pri ilia erara konduto.

Sur la stratoj ĉie en la mondo povas nun eksplodi bomboj. Atenco de fanatikuloj kontraŭ senkulpaj civitoj iĝis preskaŭ normala bildo en nia hodiaŭa mondo. Ni kondamnu per niaj plenaj fortoj ĉi tiujn atencojn, sed ankaŭ kaj precipe la kaŭzon de ili. La tro ofta kialo, ke politika sistemo kreis tavolon de maltoleremo kaj malamikeco inter najbaroj, inter amikoj. Ke landlimoj iĝas pli gravaj ol la sorto de la homoj kiuj vivas inter ĉi tiuj limoj. Ke Ni iĝas pli grava ol la mondo kie ni vivas. Mondo ne konsista ne nur el Ni sed el Ni ĉiuj. Neniam, iu popolgrupo superas alian.

Nekalkuleblajn multajn membrojn SAT bezonas, por fari eĉ la plej urĝajn laborojn, por plenumi nian taskon. Ni devas konvinki ĉiujn homojn ke alia mondo eblas. Mondo en kiu ĉiuj homoj vivas feliĉaj, pace kaj amike.

Ĉiuj homoj kiuj volas, povas malkovri ke la onidiroj kaj mensogoj, ke SAT estas unutendenca asocio baziĝas sur nur rakontetoj de stultuloj kaj eĉ malamikoj de nia asocio, kiuj ne volas fari la penon legi la vortojn de Lanti. Ili ne volas analizi kion li skribis, eble ili timas ke, se SAT atingus sian celon, la tempo de la subpremantoj, demagogoj, diktatoroj ktp estos for por eterne.

Konvinku amikon pri la grava valoro de SAT, varbu kaj helpu pligrandigi nian rondon.

SAT- membroj estas unue batalontoj, kiuj postulas respekton por la homaj rajtoj, respekton por la sorto de la laboranta klaso kaj salajruloj kaj nur poste kiam nia sociala laboro finiĝos, esperanto.

Vivu SAT!

Jakvo SCHRAM

Jugoslavio abnegacias sian nomon

Post la unua mond-milito, serba regento Aleksandar unuan de decembro 1918 proklamis unuecan reĝlandon de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj. Laŭ tiama ŝtata ideologio, Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj ne estas tri apartaj popoloj sed unu trinoma aŭ trigenta popolo. Poste tiu ŝtato estis nomita "Reĝlando Jugoslavio".



Vojislav Koŝtunica

La vorto "unueca" en proklamo ĝenis neserbajn popolojn. Krome, la ŝtato estis aŭtoritata: neniu parlamenta decido estis valida se la reĝo ne volis subskribi ĝin. La plej granda kritikisto de tiu situacio estis kroata politikisto Stjepan Radiĉ kun sia Kroata Kamparana Partio (Hrvatska Seljačka Stranka - HSS).

En la jaro 1928 okazis atenco en ŝtata parlamento. Du kroataj deputitoj estis murditaj kaj tri vunditaj, inter kiuj Stjepan Radiĉ, kiu post dek tagoj pro tio mortis. Krom HSS ekzistis eksterlande kontraŭjugoslavia grupo "ustaŝoj" (ustati - leviĝi, ustaŝo - ribelulo). Ili ne estis tiel gravaj kiel HSS. Tamen ili organizis atencon kontraŭ reĝo Aleksandar en Marsejlo (Francio) en 1934 - okaze de oficiala vizito al Francio.

Nun, la resto de eksa Jugoslavio, ne plu nomiĝas Jugoslavio. Ĝi oficiale nomiĝas Serbio-Montenegro. Montenegro estis la plej malgranda el ses jugoslaviaj Respublikoj (600.000 - 700.000 geloĝantoj). Krome, oni diras ke 40 % el Montenegranoj preferas esti kun Serbio.

Interkonsento pri disiĝo inter Serbio kaj Montenegro estis subskribita la 14-an de marto 2002. Dum la subskribado ĉeestis multaj serbaj kaj montenegraj politikistoj. Inter ili estis la ĉefaj: Prezidento de Jugoslavio, Vojislav Koŝtunica kaj montenegra, Milo Djukanoviĉ. Alvenis ankaŭ Javier Solana, reprezentanto de Eŭropa Unio por ekstera politiko kaj sekureco.

Jaron post subskribo de tiu interkonsento tiuj du landoj ekzamenis ĝin kaj eĉ volas eliri el la ŝtata komunumo.

Ministra konsilantaro havas kvin fakojn. Serbio tenas tri: defendo, eksteraj aferoj kaj ministerio pri homaj rajtoj. Al Montenegro apartenas Ministerio pri ekonomio kaj internaj komercaj aferoj. La du landoj havas apartajn valutojn, merkatojn kaj doganojn. Oni dividos ambasadorojn kaj konsulajn postenojn. Montenegro postulas duonon. Oni formos novajn instituciojn. Estas kreita nova parlamento de la nova ŝtato. En aŭgusto 2003 la montenegra polico transprenis la protekton de limoj kiujn protektis armeo.

La reakcioj de interkonsento pri disdivido inter Serbio kaj Montenegro estas diversaj. Por serba politikisto R. Ruĵiĉ tio estas la plej honta tago en historio de Serbio. Vojislav Ŝeŝelj, ekstrema naciisto, same konsideras tion kontraŭkonstitucia. Jugoslavio estas nek konfederacio, nek ŝtato. Kroataj ĵurnaloj montras plej parte kontenton. Tagĵurnalo "Novi list" (Nova ĵurnalo) skribis la 15-an de marto 2002, tagon post la interkonsento: "Jugoslavio ne plu ekzistas". En unu numero de la sama ĵurnalo aperis titolo: "Adiaŭ al Jugoslavio, kia ĝojo!". La kvinan de februaro 2003 aperas alia titolo: "Reprezentantoj de jugoslavia parlamento hieraŭ finnombris la horojn de Jugoslavio". La sama ĵurnalo enhavis eksterlandan ĵurnalo DPA kun titolo: "Jugoslavio malaperas de la terglobo".

Kadre de 53-a kongreso de SAT en Rijeka (1980), slovena kamarado Peter Zlatnar havis prelegon: "nacia problemo kaj socialismo". Li bazis ĝin sur la ideoj de fama slovena politikisto Eduard Kardelj. Li parolis por la memdecido de subpremataj popoloj en Jugoslavio. La nacia problemo estas socia. li ne akceptas ideon de "nehistoriaj popoloj". La decido pri sennacieco aŭ vera internaciismo devas esti libera por ĉiuj popoloj. Subpremado de nacioj naskas separatismon.



Milo Djukanoviĉ kaj Javier Solana

En la sama numero estas du fotoj. Sub la foto de Vojislav Koŝtunica estas teksto: "Vojislav Koŝtunica subfosis la ŝtaton ĉe kies kapo li estas. La dua foto montras Javier Solana kaj Milo Djukanoviĉ, montenegra prezidento, legantaj la enhavon de la interkonsento. En

Jugoslavio estas fakta ekzemplo ke nacia senlibereco nepre gvidas al naciismo, sanga batalo kaj fina pereo de la ŝtato. Multaj homoj estis viktimoj de tiu longdaŭra, diktatoreca kaj absurda fenomeno kiu nomiĝis Jugoslavio.

Slavko Eseŝ

RAPORTOJ PRI LA AKTIVECOJ DUM E.S.F.

Seminario N° 247 (ESPERANTO)

LOKO : BOBIGNY (pr.bobinji) salono Max Jacob (pr maks' ĵakob')

DATO : vendredon la 14an de novembro 2003 de la 14a ĝis la 17a horo

KUNORGANIZANTOJ :
HEA (Hungara Esperantista Asocio (Sro Oszkár Princz)

EDE : Eŭropo-Demokratio – Esperanto
(Sro Renato Ballaguy)

SAT : Sennacieca Asocio Tutmonda.
(Sro Emilo Mas)

TITOLO
EŬROPO DEMOKRATIO ESPERANTO (EDE)

Tri eminentuloj intervenis kaj dialogis kun **publiko el pli ol 60 personoj**. Krom **interpretantoj de la Forumo** (de la asocio « **Babels** ») al itala kaj hispana lingvoj, la **samtempa tradukado** estis plenumita al la angla lingvo de **S-ino Veronika HEE**, al la franca de **Sino Renée TRIOLLE kaj S-ro Francisko SIMONNET** . La kompleta sukceso de tiu seminario grandparte apartenas al ili. Ili estu dankataj ĉi-tie !

1)Sro **Oszkár Princz,** Ĝenerala sekretario de HEA malfermis la seminarion, memorigante al ni, ke egaleco pri lingvoj estas rajto ĉe Eŭropa Unio kaj ke nur Esperanto proponas alternativon, por bori la nunajn psikajn, sociajn, ekonomiajn kaj politikajn diskriminaciojn.

Kompare kun la naciaj lingvoj, esperanto postulas 10 fojojn malpli da energio : kial reveni al uzo de ĉevalo, kiam aŭtomobilo ekzistas ?
S-ro Princz esprimiĝis nur en Esperanto.


2)Sro Christian Garino, Prezidanto de EDE (EŬROPO DEMOKRATIO ESPERANTO) prezentis tiun sendependan movadon, kies celo estas promocii civitan agadon, okaze de la eŭropaj balotoj, favore al nia neŭtrala, libera kaj samrajtiga komuna lingvo.
Ĝiaj subtenantoj deziras konsciigi la responsulojn kaj partoprenantojn de la ali-mondistoj pri la gravaj vetceloj kiujn la lingva demando levas, rilate la tutmondiĝon kaj la juron. Tial, EDE decidis prezenti distriktajn listojn en Francio kaj en la aliaj eŭropaj landoj.
Fakte, temas pri eklanĉado de demokrata debato, liberigita de la kutimaj antaŭjuĝoj, kiuj perfidas la sciencan veron kaj tenadas individuojn kaj popolojn sub jugo de nova koloniado.
Interreto donas bazan informadon (**<esperanto.net>** kiu tamen devas esti kompletigita de objektiva amasinformigo, larĝe disdonataj : www.e-d-e.org.

3)Sro Pantaleo Rizzo, itala universitatano, doktoro pri sociologio, unue memorigis al ni, ke la interhomaj rilatoj estas ne nur permonaj. Poste, li prezentis la nunan ekaperon de novaj interrilataj strukturoj, samkiel tiajn kiujn travivas SEL, LETS, TR, SRI (interrilata strukturo pri plurflanka simetrio kaj ekonomia agamaniero pri reciprokeco). Li proponis ke ni starigu dissendoliston **en Esperanto je eŭropa skalo**, kies temo, tiam, povus esti : « Esperanto kiel komunika lingvo ĉe la reciproka mondo (eksperimentoj de la SEL , LETS, TR, SRI).

4) konkludo : raportoj kaj dialogoj kiuj sekvis, montris ja vivantan esperantan lingvon, kiu povas utile esti uzata okaze de internaciaj renkontiĝoj. Dum la Forumo, multaj gejunuloj decidis eklerni tiun esperanton.
Ja , jes ! Esperanto estas alternativo, kiu partoprenas en la konstruado de alia mondo ebla.

R.Ballaguy.
<kialni@wanadoo.fr>


Oszkar Princz



Ĉu vi jam legis ĝin?

Jen vera atesto de sincera komunista aktivulo, kiu pasigis 20 jarojn de sia vivo en Siberiaj koncentrejoj, ĉar li restis fidela je siaj idealoj.

Aĉetebla ĉe SAT aŭ en via libroservo. Prezo: 22 eŭroj + afranko.

Neŭtraleco kaj Esperanto daŭre pridiskutinda temo

Sabaton, la 8an de Novembro 2003, okazis debato en la sidejo de JEFO (franca filio de TEJO) inter kvin JEFO-anoj, unu SAT-Junulfakano kaj unu novbakita esperantisto, pri la neŭtraleco kaj la esperanta movado. Mi provos kiel eble plej fidele raporti pri la diversaj vidpunktoj, kiuj esprimiĝis dum tiu diskuto, sed mi ne garantias, ke mi perfekte priskribos la ideojn de la aliaj.

Komence, ni ĉiuj proksimume konsentis pri la neŭtraleco de la lingvo Esperanto mem. Same kiel telefono, Esperanto estas komunikilo, kiu povas esti uzata por plej malsamaj celoj de diversaj homoj. Ofte esperantistoj estas pacemaj homoj, sed ankaŭ ekzistas militemaj, faŝismemaj kaj imperiistaj esperantistoj, eĉ se ili ŝajne ne estas tre multnombraj.

La opinioj iĝis pli malsamaj kiam ni komencis paroli pri la movado, kaj ĉefe pri la mondskalaj esperantaj organizoj. ĉiuj konsciis pri la neeblo esti perfekte neŭtrala, sed ne ĉiuj havis saman ideon pri tio, kio estas tolerebla kadre de neŭtrala organizo, kiel estas UEA. Por kelkaj, ĉio estas tolerebla krom la faŝismo. Tio estas la oficiala vidpunkto de JEFO, kiu akceptas rilati kun ĉiuj politikaj partioj, krom la ekstremdekstraj. Tamen ne ĉiuj JEFO-anoj same opinias. Por aliaj, la neŭtrala fundamento, pri kiu ĉiuj devus konsenti, estas la universala deklaro pri homaj rajtoj. Pro la fakto, ke tiuj homaj rajtoj estas malrespektataj de ĉiuj ŝtatoj en la nuna mondo, oni povas konsideri, ke ĉiu, kiu ne batalas kontraŭ la nuna sociordo akceptas ĝin kaj sekve iĝas subtenanto de tiu fia sistemo. Kaj oni kompreneble ne povas toleri, ke homoj akceptas, ke iliaj fratoj daŭre mortas pro malsato, milito, nekuracado, ktp kiam la homaro disponas pri la necesaj rimedoj por certigi decajn vivkondiĉojn al ĉiuj. Ĉu vere « kompreneble » ? Ŝajnas, ke ne. Pro tio ekzistas kaj utilas SAT, kiu ebligas tolereman supertendencan debatadon inter malsamopiniantaj homoj, kiuj celas plibonigi la vivkondiĉojn de la homaro.

Do, bone, sed UEA gastigas neneŭtralajn organizojn, ekzemple katolikojn aŭ komunistojn, kiuj ambaŭ iel celas « plibonigi la vikondiĉojn de la homaro ». Do, kial ankaŭ SAT ne reiru sub la komunan tegmenton ? Al tiu demando du el ni respondis per la jena demando : Al kio utilas komuna tegmento ? Tiam, kial ne ankaŭ fondi Universalan Asocion de Retanoj aŭ de Telefonuzantoj ? Eble ĉar neniu kontestas la utilecon de Interreto aŭ de telefono, dum Esperanto restas relative malforta. Kelkaj opinias, ke ĉiuj esperantistoj konsentas pri la rolo de Esperanto kiel protektilo de diversaj naciaj aŭ etnaj kulturoj, kaj ke la ideo pri « lingvaj rajtoj », kiun subtenas multaj gvidantoj de UEA, povus esti komuna ligilo por ĉiuj. Por montri, ke tiu ideo ne estas ĉefa por ĉiuj esperantistoj, mi iom provoke asertis, ke ne ĝenus min la malapero de ĉiuj naciaj lingvoj, ĉar naciaj kulturoj povus transvivi per Esperanto. Mi atentigas, ke tio estas mia persona vidpunkto, kaj NE TIU DE SAT, NEK TIU DE SENNACIISTOJ . Tion mi diris nur por ilustri la fakton, ke tiu iom nebula nocio pri « lingvaj rajtoj » ne estas universala, kaj fakte estas nur esprimo de unu politika tendenco inter multaj aliaj.

Konklude, ni tute ne solvis la problemon pri neŭtraleco, sed nur starigis kelkajn gravajn demandojn, kiuj meritus esti daŭre pridiskutataj. Ni almenaŭ konstatis, ke la tradicia dispartigo inter la neŭtrala UEA-movado kaj la malneŭtrala SAT-movado ne estas tiel kaduka, kiel oni foje kredas. Tio evidente neniel malpermesas la starigon de amikaj rilatoj inter ambaŭ organizoj.

Vinko Markov

HELPU LA ASOCION FINANCE KAJ PER VIA AKTIVA KUNLABORO

SAT ESTAS VI !

MALLONGE - KLASBATALO

Martiniko kaj Gvadalupo

Strikoj kaj blokadoj en pluraj ekonomiaj sektoroj lastatempe multiĝis, kiam laboristoj kontraŭis minacojn de dekstra registaro ataki vivkostan indicon.

Italio

Novembre okazis amasa striko kontraŭ reformo de pensioj. Tiu estas la unua amasa striko, kiun alvokis la malpli tradiciaj, pli sendependaj sindikatoj.

La lando de l'liberaj

Ministroj el 34 landoj eble malkontentiĝis kiam la FTAA (Liber-komerca Regiono de la Amerikoj) pintkonferenco devis fermiĝi iom frue post kiam miloj da geaktivuloj atingis Miami, Usono por kontraŭi ĝin. Sed eĉ antaŭ la pintkonferenco, malkonsento estis efike kriminaligita de la registaro kaj burĝa amaskomunikilaro. Policanoj arestis pli ol 250 homojn, kaj pli ol 50 aliaj estis arestitaj ĉe sekvanta protesto kontraŭ tiuj malliberigoj. Sendependaj ĵurnalistoj estis ankaŭ arestitaj, kaj la kaŭcio por kamarado el New York Indymedia (sendependa amaskomunikilo) estis $10,000! Leĝa helpteamo konfirmis, ke 5 el la arestitaj estis seksperfortitaj, 12 aliaj estis batitaj ĉar ili rifuzis konfirmi siajn naciajn aŭ civitanajn rangojn, kaj multnombraj homoj estis atakitaj per pipra ŝprucpistolo.

Rob

LE MONDE diplomatique en ESPERANTO
Decembro 2003
http://eo.mondediplo.com/

Kiel promesite, bonvolu trovi ĉi tie la ĉefartikolon de la decembra numero de "Le Monde diplomatique" en Esperanto. Por la aliaj bv. kliki sur la supran retadreson.

Irako, la « porkejo »

« Ribelo fareblas de 2 % da aktivuloj kaj 98 % da pasivaj simpatiantoj. » T.E. Lawrence

En *LA PORKEJO* [1], unu el la plej bonaj romanoj pri la Vjetnam-milito, Gustav Hasford rakontas kiel, rekrutitaj en la *marines*, junuloj estis transformitaj al timigaj militistoj por esti poste ĵetitaj en la ĥaoson de konflikto kie ilia formado montriĝis neadaptita. Ĝi ne servis al ili por alfronti nevideblan malamikon, sen fronto nek ariero, moviĝanta kvazaŭ mortiga gaso...

Irako ne estas Vjetnamio. Sed jam, dum tiu ĉi « Nigra ramadano », inversiĝis la roloj : la atakantoj troviĝas en defensivo. Kaj la usona ekspedicia korpuso havas nun kiel ĉefan celon : protekti sin mem kontraŭ la batoj kiujn faras al ĝi pli kaj pli aŭdaca rezistado. La ciferoj estas klaraj : 10 atakoj kontraŭ la okupacianto en julio, 35 hodiaŭ, kaj ĉirkaŭ 10 usonanoj mortigataj semajne... Sen enkalkuli la mortigajn atencojn kontraŭ la helpantoj britaj, italaj, polaj, hispanaj... Tio fariĝas premsonĝo.

Kun apokalipsa fajropovo, la usonaj strategiistoj limiĝis, por konkeri Irakon, al aplikado de la aksiomo de la marŝalo Foch laŭ kiu la moderna milito konsistas en serĉado de la koro de la malamika armeo, la centro de la potenco, kaj detrui ĝin en batalo. Detruo des pli facila ĉar la iraka armeo volatiliĝis antaŭ Bagdado kaj, por tiel diri, ne bremsis - nek detruitaj pontoj, nek neniigitaj flughavenoj - la alvenon de la konkerantoj.

Oni povas demandi sin ĉu ne estis strategio, nome lasi la invadantojn enpenetri por poste kapti ilin en malsimetria konflikto de longega daŭro. Ĉar la usonaj fortoj estas nun por longa tempo « fiksitaj » en Mezopotamio, ĉar ĉia urĝa foriro sekvigus internan militon kaj « libanigon » de Irako, kiu transformus tiun landon, por jardekoj, al monda « malordiga fonto ».

La teoriistoj de la rezistado difinas ĝin tiel : *« La malamiko antaŭeniras, ni cedas ; la malamiko fiksiĝas, ni turmentas ĝin. »* Sun Tse, unu el la plej antikvaj pensistoj pri milito, konsilas ankaŭ ekspluati la malfortojn de la potenculo : *« Evitu lian forton »*, skribas li,*« frapu lian malfirmecon »* Zorgante pri tio ke ĝi neniam liveru celon al la okupaciantoj, la celo de la irakaj ribeluloj estas trudi al la usonanoj la kiom eble plej longan pasivan defendlinion, kiu estas la plej multekosta formo de milito.

La spiralo de perforto tiel do startis senhaltigeble. Kaj la subpremado, kiu duobliĝos ekde kiam ekagos la kvazaŭarmeaj milicoj kreitaj de la okupaciaj aŭtoritatoj, eĉ vigligos la rezistadon. Nutrata de la malamo al la invadinto, venĝodinamiko kaptos la okupaciajn fortojn, konfuzitajn, kiuj penas distingi siajn malamikojn disde siaj « amikoj ». Ili oftigos « misagojn » kontraŭ tiuj « amikoj », kiuj estas cetere konsiderataj kiel « kunlaborantoj » kaj pro tio konstituas prioritatan celon por la rezistantoj.

Jam la 130 000 usonaj soldatoj [2] - inter ili nur 56 000 veraj batalistoj [3] - montriĝas nesufiĉaj por « sekurigi » la landon. Irako fariĝis la eldorado de privataj sekurec-firmaoj.(Kp Thomas Catan kaj Stephen Fidler : « The military can't provide security »), La eksterlandaj ambasadejoj, la okcidentaj entreprenoj ĝuantaj rekonstru-kontraktojn (precipe usonaj kaj ligitaj kun la Bush-registaro [4]), la ministrejoj kaj aliaj publikaj instancoj estas protektataj de miloj da dungit-soldatoj rekrutitaj de privataj komplotejoj kiel Erinys, kiu dungis 6 500 homojn por gardi la naft-instalaĵojn, Global Risk, taskita protekti la membrojn de la Provizora Registar-Konsilio, Vinnell, kiu trejnas la novan irakan armeon, Dyncorp, kiu formas la novajn policanojn, kaj Olive, kiu protektas la altrangulojn de la grandaj usonaj kompanioj.

CETERE, ANSTATAŬ MAL-PERSVADI la internacian terorismon, la okupacio de Irako tragike stimulis kaj relanĉis ĝin. Atestas pri tio la fiaj atencoj kiuj oftiĝas de Kasablanko ĝis Riado, de Mombaso ĝis Istanbulo. Dume, la projekto starigi demokration en Bagdado malproksimiĝas ĉiutage pli... Kiom foras la tempo kiam la « falkoj » de la Pentagono anoncis ke la invadaj fortoj estos akceptotaj kiel liberigantoj... El tiu enorma analiz-eraro devenas la nuna fuŝejo. Ebriaj je potenco, la vaŝingtonaj ideologoj (Cheney, Rumsfeld, Wolfowitz). Ekde nun, ĉio turniĝas kontraŭ ili.

Ignacio RAMONET

Tradukita de:
Vilhelmo Lutermano
el la franca originalo.

[1] Film-adaptita de Stanley Kubrick titolita Full Metal Jacket (1987).

[2] Sen mandato de la UN, la okupaciaj fortoj nombras 155 000 homojn kaj venas de 34 landoj (el kiuj neniu araba aŭ islama regno).

[3] Kompareblaj kun la 39 000 homoj kiuj zorgas pri la ordo nur en la urbo Nov-Jorko...

[4] La firmaoj kiuj dividas inter si la fabelan predon de rekonstruado - 8 miliardojn da dolaroj - estas tiuj kiuj pleje helpis la kandidaton Bush dum la elektoj de novembro 2000, laŭ raporto de la Center for Public Integrity, 30-an de oktobro 2003.

NE FORGESU PAGI LA KOTIZON !

EŬROPA IDENTECO MALLONGE

1. **Homo estas socia estaĵo** (socio estas minimume 2 personoj, se ili evoluigas reciprokan konfidon kaj komunan kredon)
2. **Homo kontentigas sian sociemon en multaj socioj samtempe** (grupoj), kiel familioj, amikaj rondoj, societoj, lokaj komunumoj, vilaĝo aŭ urbo, regiono, popolo, religio ktp.

Ĉiu el la grupoj evoluigas socian (grupan) identecon (komunajn celojn, elementojn de samtipa konduto, komunajn ceremoniojn, folkloraĵojn kaj kulturon, elektas sian gvidantaron…)

3. **Unuopulo en sia vivo aliĝas al novaj kaj forlasas malnovajn grupojn** (familion, en kiu oni naskiĝis oni forlasas kaj fondas la propran aŭ plurajn proprajn, el unu urbo oni translokiĝas al alia kaj oni ŝanĝas sian lokan apartenon, aŭ eĉ la religion aŭ patrujon – foje pro transloĝiĝo, foje pro tio, ke oni forprenas ĝin de ni (ekzemple post militoj…)
4. **Identecojn de forlasitaj grupoj oni ne perdas** (post fondo de la propra familio oni ne ĉesas esti membro en sia naskiĝfamilio, post forlaso de la patrujo kaj iompostioma akcepto de la nova oni ne forgesas la malnovan…) kvankam la grado de la aparteno iome malfortiĝas.
5. El tio sekvas, ke estas normale **al la jam ekzistantaj identecoj aldoni novajn**, kia ekzemple estas la eŭropa identeco. Kun la alpreno de nova identeco **oni ne forviŝas la malnovajn** (ekz. popolan, regionan, religian ktp)
6. **La ĉefa signo de identeco estas lingvo** (se ni akceptas, ke ĉiu varianto de lingvo aŭ dialekto estas aparta lingva sistemo). Ekz. publikloke ni parolas la lernitan nacian lingvon, en nia vilaĝo ni parolas regionan aŭ lokan dialekton, en strata bando ni parolas bandan slangon, en familio ni parolas familian varianton de la loka dialekto, kun etaj infanoj ni parolas varianton de infana lingvo, kun handikapita infano ni parolas adaptitan lingvon, kiun ĝi kapablas kompreni ktp)
7. **Lingvo havas du samgravajn bazajn funkciojn: la komunikan kaj la identecan.** Kiam tiuj du funkcioj konfliktas inter si, pli gravas la identeca funkcio (ofte ni intence parolas nian minoritatan lingvon, kvankam ni scias, ke oni ne komprenas nin, ĉar tiam la celo ne estas komuniki sed montri sian apartenon)
8. **Nova identeco nepre necesigas la ekziston de nova identeca lingvo, kiu estas diferenca de ĉiuj aliaj, ĉar ĝi devas esti neŭtrala.** Tiu lingvo signas la novan apartenon (eŭropan). Tiun lingvon devas akcepti apartenatoj de la nova komunumo emocie (ne nur racie) kiel sian, ili devas havi emocian rilaton al ĝi. Kaj tio estas ebla nur, se por ĉiuj apartenantoj de la nova komunumo ĝi estas la sama, sed diferenca de ĉiuj aliaj. Koncerne la eŭropan lingvon, la angla ne povas fariĝi identeca lingvo, kvankam ĝi jam servas kiel komunika lingvo kaj ĝi ne povas kontribui al la evoluigo de eŭropa identeco, ĉar la eŭropa identeclingvo devas esti neŭtrala rilate al ĉiuj membroj (la angloj kaj irlandanoj ne rajtas esti privilegiitaj) kaj ĝi devas nepre diferenciĝi de identeclingvo de USONO, ke eŭropanoj estu fieraj pri siaj valoroj, kaj ke sian fieron rilate la apartenon ili montru parolante sian kaj ne amerikan lingvon. Kompreneble, ke la identeca lingvo transprenos ankaŭ la rolon de la komunika.
9. **Neŭtralan lingvon oni povas akiri je tri manieroj:**
   a) **elektante nacian lingvon, kiu apartenas al neniu el la popoloj, kiuj aliĝas al la nova komunaĵo**, ekz. la araban. Tian solvon oni elektis en ekskoloniaj landoj, kiel la angla en Bharato (Hindujo) aŭ Niĝerio, la franca en iuj afrikaj landoj ktp.
   b) **elektante iun el la mortaj lingvoj**, kiujn oni povas revivigi, sur kies bazo elkreskis historie eŭropa kulturo, kiaj estas la latina aŭ la malnovgreka. Tian solvon elektis israelanoj, kiam la mortan hebrean ili renovigis kaj »revivigis«.
   c) **elektante iun el la novlatinidaj lingvoj, kiujn iniciatis lingvistoj aŭ iuj movadoj kiel Esperanto**, (kiu evoluigis dum sia pli ol 100-jara historio apartan kulturon kaj lingvan trezoron). Tian solvon oni elektis en Indonezio kaj en kelkaj aliaj polineziaj landoj (Bahasa indonesia estas lingvo, kiun baze de malaja lingvo ellaboris lingvistoj reguligante plane la gramatikon meze de 1950-aj jaroj kaj tiun lingvon nun uzas 200 milionoj da homoj).

Sovetunio kaj Jugoslavio ne konsciis pri la identeca rolo de lingvo, kaj ili klopodis evoluigi sovetan respektive jugoslavan identecon uzante la lingvon de la plej granda popolo, kiu ja servis kiel komunika lingvo, sed ne povis esti akceptita kiel lingvo de komuna identeco, ĉar ĝi ne estis neŭtrala. Tial ili ne sukcesis evoluigi komunan novan identecon. En kriza tempo tio estis sortoporta kaj esence influis al la disfalo de tiuj plurpopolaj ŝtatoj.

Sen solvo de tiu problemo Eŭropa Unio disfalos okaze de la unua pli grandskala ekonomia aŭ politika krizo.

Asocio por Eŭropa Konscio Maribor
Besednjakova 1 tel. 02-4200669
E-mail: zlatko.tisljar@siol.net

VIAJ OPINIOJ

PRI LA MILITO EN IRAKO

Unuafoje mi permesas al mi skribi pri afero kiu doloras min.

Pia Bush neglektis siatempe alvokon de papo kontraŭ milito en Irako kaj en majo 2003 anoncis venkon kaj finon de la milito. De tiu tempo en publikaj medioj ĉiam oni aŭdis pri aĉaj teroristoj kiuj murdas pacajn soldatojn de Usono kaj de aliaj satelitoj. Ĝi estas falso kaj aĉa mensogo, de ĉiuj politikistoj kiuj parolas pri irakaj teroristoj. La vero estas, ke la milito en Irako plue daŭras. Usonanoj uzas por tiu milito modernan teknikon, tankojn, raketojn, aviadilojn por plej sukcese detrui irakan popolon kaj samtempe ŝirmi kontraŭ morto siajn soldatojn. Kontraŭe irakanoj batalas helpe de eksplodaĵoj dediĉante samtempe sian propran vivon. Oni povas antaŭvidi ke usonanoj kaj iliaj satelitoj detruos komplete Irakon sed finfine iraka popolo ne estos venkita. Nenia armilo povas venki fortan animon. Ĉu amerikanoj por tiu venko pretas dediĉi siajn proprajn vivojn? Same kiel tion pretas Irakanoj? Certe ne. Amerikanoj estos devigitaj forlasi Irakon vivaj aŭ en ĉerkoj. Simile kiel tio okazis iam en Vietnamio. Mi tutkore tion deziras al ili.

Wladyslaw Burszta (33172)

NI NE PLIALTIGIS KOTIZOJN POR 2004

DO PAGU TUJ !

SLOVAKIO

MALEGALECO INTER VIRINOJ KAJ VIROJ

Ankaŭ en Slovakio, la leĝo pri la egalrajteco inter virinoj kaj viroj ĝis nun ne ŝanĝiĝis. Kiel en ĉiuj landoj de la mondo, ankaŭ ĉe ni estas virinaj kaj viraj salajroj. La kialo estas ke la plejmulto el "virinaj" laboroj (profesioj) estas malpli pagataj. Tiuj profesioj estas rezervitaj por virinoj kaj tion ne faras viroj. Do en tiu ĉi sfero Ministerio de laboro, sociaj aferoj kaj familio kune kun Kunordona komitato por virinaj problemoj volus fari paŝojn antaŭen. Instruiteco de virinoj kaj viroj en Slovakio estas la sama. En mezaj kaj altlernejoj studas pli da virinoj ol viroj, sed malgraŭ tio en plej multaj entreprenoj, en plej gravaj postenoj estas 90 % da viroj. En la landa parlamento estas malpli ol 15 % da virinoj. Laŭ ministro de laboro, sociaj aferoj kaj familio, Petro Magvaŝi, estas grave, ke la virinoj havu eblecon decidi. Nur poste ili povos realigi leĝdonajn kaj aliajn ŝanĝojn kaj ĉe kreo de leĝoj, pripensi kian konsekvencon ĝi povos havi por virinoj. Laŭ ekzemplo de Finnlando, kiel diras ministro, virinoj devus unue havi influon precipe en ekonomio kaj poste ankaŭ en politiko. Oni devus dediĉi atenton al perforto en familio kaj konstruo de strukturoj kiuj koncernas ilin. En tio, laŭ ministro, estas tre grava klereco. Virinoj devas ricevi ŝancon kaj egalrajtecon kiel viroj.

Rajtoj kaj respondeco

Plej multaj el virinoj deziras labori kaj samtempe havi familion. Tre ofte, ĉefe en privataj entreprenoj, la patrinoj de etaj infanoj estas diskriminaciataj okaze de la dungo. Same estas okaze de reveno al antaŭa laborloko post la patrinecpaŭzo. Ankaŭ la aĝo, okaze de laborpeto fariĝas handikapo, ekzemple por kvardekjarulinoj. Flanke de ministerio kaj de statistiko oni konfirmas la diferencojn inter salajroj de viroj kaj virinoj por la sama laborvaloro. La viroj estas preferataj jam tradicie kiel vivtenantoj de familio. Tio okazas en ĉiuj sferoj kie laboras viroj kaj virinoj. Slovakaj virinoj estas daŭre nedecidemaj. Dum la balotoj ili voĉdonas por viroj kaj opinias ke la gvidposteno apartenas al viroj. Sed aliflanke estas por ili maljuste diferencoj en salajroj aŭ en labormetodo. Sed, ili ne havas kuraĝon prezenti tion kaj publike protesti.

Al plej virinaj branĉoj en Slovakio apartenas la instruado - lernejoj. Virinoj dominas en ĉiuj tipoj de lernejoj, de infanĝardenoj ĝis mezaj lernejoj. Precipe ili laboras en infanĝardenoj, kie ilia partopreno estas centprocenta. En specialaj kaj bazaj lernejoj laboras 83% da virinoj, en gimnazioj 75 %, en mezaj kaj faklernejoj, instruinstitutoj laboras 66%. Al la virinaj branĉoj apartenas ankaŭ sano, socialaj aferoj, komerco, restoraciaj servoj kaj malpeza industrio. Ilia komuna fakto estas pli malaltaj salajroj je nivelo aŭ sub la nivelo de meza salajro.

M. Zavodsky

BULGARIO

20,6 % DA BULGAROJ DRONAS EN ŜULDOJ

Nuntempe 20,6 % da bulgaroj dronas en ŝuldoj, kaj 66,3% apenaŭ sukcesas vivi de la unua ĝis la lasta tago en la monato. Tion montras la faktoj post esplorado de la Nacia statistika instituto dum oktobro 2003. Nur 4% da bulgaroj nun ŝparas, kaj 47% respondis, ke ilia financa situacio ne ŝanĝiĝis dum la lastaj 12 monatoj. La financa situacio de 25,3% da bulgaroj malboniĝis malpli rilate al 2002.

Plej multaj el la enketitoj ne atendas ŝanĝojn de sia financa situacio dum 2004 jaro. 75,7% opinias ke ne certe ili povos ŝpari dum sekvantaj 12 monatoj. 80,9% perdis esperon aĉeti aŭton en 2 venontaj jaroj kaj 92% - loĝejon. La elspezado de granda sumo por plibonigi sian komforton en la loĝejoj ne estas ebla por 78,2% de la logantaro.

Laŭ la instituto, la vendo de varoj kaj servoj en la sektoro "komerco", riparo de teknikaĵoj por la dommastrumado kaj aŭtoj, inter januaro kaj septembro 2003 plialtiĝis je 7,7% kompare al 2002. Ankaŭ malaltiĝis la komerco de nutraĵoj je 4,7%, aŭtoj 2,4%, teknikaĵoj 15,8%, vestaĵoj kaj ŝuoj 4,7%, trinkaĵoj, cigaredoj, legomoj, fruktoj, grenoj kompare al 2002.

El la ĵurnalo "Viĵ-Vidu" - 12.11.03 - tradukis Cvjatko Todorov (34.593)

AGADOJ DE SAT-EN-HISPANIO

Kiel ni informis vin en antaŭa artikolo en “Sennaciulo”, ni fondis rondon SAT-en-Hispanio, por plenumi la celojn de la LEAoj en la Hispana Regno. Tion jam aprobis SAT en la Ĉaŭdefona kongreso, per la agnosko kiel LEAo laŭ la konvencio de Gotenburgo. La asocio iom post iom firmiĝas, kaj eksterne agadas. Permesu ke ni ion rakontu al vi pri niaj lastaj demarŝoj. M e z e de julio celebriĝis hispana kongreso en Valencio, kiun ni profitis por okazigi la Ĝeneralan Asembleon de la asocio. La etoso estis ĉefe laborema, ĉar ni konstatis ke nur per konstanta laboro, kaj ne per solenaj deklaroj, ni povas antaŭenigi la marŝon de nia lingvo en la progresemaj movadoj. Ni aprobis la raporton kun la jam faritaj agadoj, kaj ni konfirmis dum unu plia jaro la aktualan estraron. Kelkaj kamaradoj signalis la neceson ellabori propran programon, kiu montru la ĝeneralan celon kunigantan la asocianojn kaj taŭgu kiel kadro por niaj estontaj agadoj. Ĉar tio postulus pli da tempo, oni nenion decidis en tiu asembleo, sed oni konsideras tiun ĉi diskuton kiel neceson por postaj kunvenoj.

Sed nia programo koncentriĝas ĉefe sur la ekstera informado, sur la disvastigo de la rolo de nia lingvo en la medio kiu nin ĉirkaŭas. La laboroj pri tiu ekstera informado jam ekis, por kio interalie ni sendis informojn al diversaj progresemaj movadoj kaj asocioj. Ni redaktis flugfoliojn kun niaj celoj kaj proponoj, kaj ni kompletigas iom post iom nian retpaĝon, kiun ni denove invitas vin viziti regule (http://satenhispanio.eresmas.com).



"Laboristoj de mia Patrujo, mi havas fidon pri Ĉilio kaj ĝia destino. Superpasos aliaj homoj ĉi tiun grizan kaj amaran momenton kiam la perfido celas sin trudi. Vi pluiru, sciante ke multe pli frue ol tarde, ree malfermiĝos la grandaj aleoj kie pasos la libera homo por konstrui pli bonan socion.

Vivu Ĉilio!. Vivu la popolo!. Vivu la laboristoj!.

Ĉi tiuj estis miaj lastaj vortoj, kaj mi certas pri tio ke mia sinofero ne estos senutila. Mi certas pri tio ke ĝi almenaŭ estos morala leciono kiu punos la mallojalecon, la malkuraĝon kaj la perfidon."



En la retpaĝo reliefiĝas unu el niaj lastaj kampanjoj, la kunmemoro de la puĉo kiu renversis la socialistan registaron en Ĉilio, kaj mortigis ĝian prezidenton Salvador Allende. Interalie ni inkludis tie la tradukon al Esperanto de la lastaj vortoj de la ĉilia eks-prezidento, tiu kortuŝa alvoko al la espero kaj al la digno kiun vi eble parte konis en resuma nacilingva traduko, kaj kiun vi nun povas gustumi kompleta en nia lingvo. (Vidu noton aparte)

Laŭ la rezolucio aprobita en la SAT-Kongreso, ni disvastigas en hispanaj medioj informojn pri la partopreno de SAT en Eŭropa Socia Forumo, kaj ni komencis esplori aliajn eblecojn de kunlaboro en tiu iniciato.

El informa vidpunkto, nia plej grava aktivado lastatempa estis la partopreno per propra budo en la tradicia festo de la Hispana Komunista Partio dum la dua semajnfino de septembro. Tiu ĉi okazaĵo kunigas amason da ĉiutipaj homoj, kiuj tien iras por partopreni ne nur politikajn prelegojn kaj debatojn, sed ankaŭ por ĝui etoson festan, kaj kiun ni konsideris kiel plej taŭgan lokon por la diskonigo de nia lingvo kaj niaj proponoj. La tasko plenumita estis tute sukcesa: nin vizitis granda kvanto da homoj interesitaj, kiuj prenis nian informan materialon, kaj nin demandis pri nia laboro kaj niaj celoj. Plej kurioza estis eble la sento de surprizo kiu vidiĝis en multaj vizaĝoj, ke Esperanto ankoraŭ viglas kaj povas proponi solvojn pri la internaciaj rilatoj. Ni konsideru ke en Hispanio ekzistis tre grava movado laborista antaŭ la


civila milito, kiu tre malfortiĝis (fakte formale malaperis)



post la alveno de la frankista reĝimo, kaj tial vidiĝis ke por multaj homoj progresemaj, Esperanto estas aŭ relikvo de la pasinto aŭ ĝi ligiĝas al alitipaj movadoj. Ni devis do informi pri la propra vidpunkto de nia movado, kaj ni devas diri ke ĝenerale ni vidis akcepton aŭ komprenemon. Ni ankaŭ disvendis librojn, kaj tiurilate la plej kurioza sekvo estas ke, post la lerniloj kaj vortaroj, la plej vendata ero (la "furoraĵo", se tiel diri), estis la esperanta traduko de la "Manifesto komunista", kiu tie elĉerpiĝis, kaj kiu estis aĉetata ĉefe de personoj ne scipovantaj Esperanton, kiuj verŝajne aĉetis ĝin kiel kuriozaĵon aŭ "relikvon". Ni pensas ke ni ĉefe ĵetis multajn semojn, kiujn ni atendas ke ili fruktiĝu en baldaŭa momento.

Tonyo

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,64 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7,29 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 10,40 € (reg. afranko).

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (€) anonime 100,00; anonime 70,00; anonime 60,00;
En Belgio (€) J. Verstraeten 50,00;

NEKROLOGO

En St. Appolinard (FR) mortis 70-jara, nia malnova membro, k-do

Jean DETTWILLER
(matr. 28.226)


Ni kondolencas al familianoj kaj geamikoj.

S.A.T.  ERINACO


DISTRA PAĜO POR SERIOZAJ SAT-ANOJ

ONI TROVIS DABLEJU !
G. W. BUSH





Oni trovis lin sep metrojn sub la Blanka Domo, ok monatojn post la fiasko en la prezidentaj elektoj de la jaro 2004 !



VIVO DE LANTI

La libro, Vivo de Lanti, estas ne nur historie altnivela sed ankaŭ literature aŭ beletre altnivela. Legante la komencan parton pri la junaĝo de Lanti, mi sentis ke mi legas kvazaŭ novelon. Nepre leginda por ĉiuj esperantistoj, sen diri pri SATanoj.

Tani Hiroyuki
tnhryk@pop07.odn.ne.jp

SAT Kulturpaĝo



redaktanto Cezar

Karaj geamikoj,

la malnova jaro estas nun jam pasinta, kaj la poeto Viljono eble demandus: kie estas la neĝo de la pasinta jaro? Mi iris kiel ofte je Silvestro kun mia kara kaj du sektboteletoj* en la dorsosako en la kastelan parkon. Kaj tie ni rigardis de supre kun aliaj la piroteknikajn lumludojn en la urbo. (La lokon vi vidas sur mia foto kun la urbomuro kaj la arbo.) Kaj ĉifoje ni deziris al ni noktomeze krom privataj aferoj ankaŭ tion: ke multaj SAT-anoj helpu al ni ĉe nia kulturlaboro por SAT, pri kies kulturpaĝoj en la ttt-ejo mi tuj raportos. Al ni ambaŭ denove tre plaĉis, sed ni scias, ke aliaj pensas tute alie pri la Silvestra bruo kaj ĝia "polucio per lumo". Tial mi enmetis la tekston de la usona laboristo kaj verkisto Charles Bukowski. En tiu parko mi fotis ankaŭ la skulpturon de la ministo, kiu tie jam staris, kiam la "heroaj" laboristoj en GDR ankoraŭ estis glorataj en oficialaj paroladoj, dume oni neoficiale sufiĉe ofte ridis pri ili. Niajn ministojn en la regiono tio ne tro ĝenis, tion mi scias de la avo de Donjo, kiu tre fieris esti ministo. Tial mi tute ne miras, ke ankaŭ la skulpturo spite al la frosto bone eltenas. La laboristoj devas elteni multon. Kaj la figuro certe ankoraŭ tiam staros en la parko, kiam la kapitalismo jam delonge estos finita. La poemon de la ruso Hohlov mi elektis, ĉar ĝi montras kiel fabela la vintro povas esti kun la favoro de Amor'. Kaj kiam oni venas hejmen post promenado tra la dika neĝo, ĉiu manĝo gustas duoble pli bone ol normale. Elprovu tiam foje la spagetojn kun kantareloj laŭ la recepto de mia edzino. Ĝi facile estas farebla kaj vere tre bone gustas, kiel ĉio, kion ŝi kuiras.

Via kulturredaktoro Cezar

*Sektboteletoj: boteletoj de ŝaŭmvino.

SAT-kulturo ne falas el la ĉielo ni faras ĝin!


PUNĈO



Al ĉiu punĉo apartenas kvin aldonaĵoj.

Kial ĝuste kvin da ili?

La punĉo devenas de la hinda vorto kvin: "pantŝ". Kaj origine la punĉo konsistas el kvin partoj: el arako aŭ rumo, teo, akvo, citrono kaj sukero. Multe da plezuro ĉe la trovado de la ĝusta miksaĵo!



Charles Bukowski

Palmfolioj en pluvo

Ĝuste noktomeze,
silvestre de la jaro
1973 en Los Anĝeleso,
komencis pluvi sur la
palmfoliojn antaŭ
mia fenestro, ekhurlis la
hupado, la krakado de la
piroteknikaĵoj,
estis infera bruo.

Mi enlitiĝis jam
je la naŭa vespere,
forŝaltis la lumon
kaj tiris la litkovrilon
super min...
Ilia petolado, ilia
gajeco, ilia kriado,
iliaj paperĉapeloj,
iliaj aŭtoj, iliaj virinoj,
iliaj amatorecaj drinkadoj
ĝis ebrio...

En la silvestronokto
kaptas min ĉiam
horora sento. La vivo,
mi pensas, estas ja ne
deŝirkalendaro.

Nun la hupado
ĉesiĝis. Neniuj
artfajraĵoj plu,
neniu tondrado. Post kvin
minutoj ĉio finiĝis.
Ĉion, kion mi aŭdas,
estas, kiel pluvas sur la
palmfoliojn, kaj mi diras
al mi: Mi neniam komprenis
la homojn, sed mi sukcesas
vivi kun ili.

tradukis Cezar

SAT-kulturo prezentita en la interreto

En la nova SAT-retejo http: //www.satkulturo.de interesiĝantoj povas rigardi per komputilo al si nian kulturan hejmpaĝon, en kiu troveblas jam nun multaj kontribuoj de SAT-anoj: Dorothea Kaiser, Gary Mickle, Vilhelmo Lutermano, Rob Blow, Jakvo, Tonyo del Barrio, D. Kesssous kaj de aliaj, ankaŭ multaj de mi mem.

Kiam mi elpensis la koncepton por tiuj paĝoj, mi tuj dekomence volis havi tion tiel, ke ni donu al ĉiuj esperantistoj la eblon sendi al ni siajn tekstojn, fotojn, bildojn kaj artikolojn, ĉar ni faru nian SAT-kulturon ne nur por ni mem, sed por ĉiuj esperantistoj, kiuj simile al ni volas, ke progresu nia bona afero. (Ili povas esti niaj venontaj membroj!) Eldoni libron en presita formo multekostas. Kaj tial hejmpaĝoj estas bona alternativo, por ke tekstoj kaj bildoj ne "ŝimu" en iuj komputilaj aŭ regalaj* anguloj. Hejmpaĝoj povas helpi limigi la potencon de eldonejoj, kiuj traktas verkistojn kiel sklavojn kaj almozpetantojn. Ili povas esti instigo por verkistoj. De la brazilanino Magia Cigana mi scias, ke ŝi tre ĝojas esti prezentata kun siaj originalaj poemoj en niaj poemkolektoj. Kaj tio estas tre bona afero por ni ĉiuj. Rifuzitaj bonkvalitaj tekstoj kaj tutaj manuskriptoj ĉe ni tamen povas trovi lokon, kie ili legeblas. Kulturo estas multfaceta afero. Tial Frank Vohla kaj mi grupigis nian kulturpaĝojn kiel sekvas: arto (kun beletro, bildartoj, filmo kaj teatro, muziko, plastikaj artoj), sciencoj (kun Esperanto, naturscienco, socioscienco), homoj kaj naturo (kun kuirartoj, portretoj, turismo). Tiuj grupoj havas siajn subgrupojn, en beletro ekzemple: aforismoj, infanliteraturo, poemoj, rakontoj , romanoj, fabeloj.

Kontribuoj, kiuj en vasta senco subtenas nian batalon por mondo sen kapitalismo, estas ĉiam tre bonvenaj. Sendu ilin al mia adreso: kaiser-altenburg@t-online.de aŭ per poŝto al Hans-Georg Kaiser, 04600 Altenburg, Wenzelstr. 12 en Germanio.

*regalaj: tirkestaraj



BONAN APETITON!

Spagetoj kun kantareloj
(por kvar personoj)

Necesas: 50g da butero* 400g da spagetoj* 1 ajlobulbero* 1 cepo* 500g da kantareloj* salo* pipro el la muelilo* petroselo* 4 l da akvo*

Faru tiel:

1. Senŝeligu kaj distranĉu la cepon en kubetojn.
2. Fandu buteron en pato kaj stufu la cepon, ĝis ĝi aspektas vitreca.
3. Purigu la kantarelojn kaj distranĉu ilin en grandan pecojn.
4. Metu la fungojn en la paton kaj iom rostu ilin.
5. Spicu per salo, pipro kaj la dispremita ajlo.
6. Nun aldonu 2 supkulerojn da akvo kaj finstufu ĉion kun kovrilo sur malgranda flamo.
7. Ŝutu la spagetojn en grandan poton kun 4 l da salita bolanta akvo kaj kuiru ilin nur tiom, ke ili ankoraŭ sufiĉe firmas ĉe la mordoprovo. ("al dente").
8. Metu la kuiritajn spagetojn en grandan kribrilon, por ke trafluu la akvo.
9. Miksu la spagetojn kun la kantareloj kaj la petroselo.

Konsilo: Al tiu manĝo mi rekomendas sekan blankan vinon.

Bonan apetiton deziras Donjo!



Nikolaj Hohlov
(1891-1953)

VINTRA FABELO

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad'
Ni veturas - aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'.

En sereno de l' ebeno malaperas la fadeno
De la glata vintra voj'...
Mia Nita - am' subita, de la frost' ebriigita
Alpremiĝas en la ĝoj'.

En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor',
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor'!

Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin',
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu
Per freneza takto nin!

Brila neĝo - vintra reĝo - ĉion tenas en sieĝo
Gaje ĉirpas en la knar',
La survoja vento ĝoja en malklara gam' hoboja
Vokas, logas al kampar'.

Unu suno - unu juno... la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem'...
Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alprem'!



77-A SAT-KONGRESO BRATISLAVA (SK) 2004--08-14/21

Organiza garantianto : KAVA-PECH, kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle, kunorganizanto: ESO, Esperanto-Societo Bratislava.

Koresponda adreso: KAVA PECH, Anglicka 878, CZ-25229 Dobrichovice. Tel: +420 257 712 201; fakso: +420 257 712 126; rete: info@kava-pech.cz; http://www.kava-pech.cz.

OKK: Petro Chrdle, Zdenek Pluhar, Jana Melicharkova, Jarmila Rechtorysova.

La 77-a SAT-kongreso okazos unuan fojon en Slovakio, precize en ĝia ĉefurbo Bratislava, kiu logas kaj pro sia beleco urba, kaj pro la konekto kun bela naturo: rivero Dunaj (Danubo), montetaro Malé Karpaty (Malgrandaj Karpatoj).

Kongreskotizoj (en Eŭroj)	ĝis 31.01.04	ĝis 30.04.04	ĝis 30.06.04	pli poste
SAT-membro	55	65	75	85
SAT-geedzoj (se ambaŭ)	80	95	110	125
SAT-junul(in)o ĝis 25 j.	25	30	35	40
Nemembro de SAT	70	80	90	100
Junula nemembro de SAT	35	40	45	50

Infanoj ĝis 10-jaraj ne pagas kotizon.
La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SI, SK ĝuas 30% rabaton. La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa YU (krom SI, eksa SU kaj ekster Eŭropo (krom Aŭstralio, Israelo, Japanio, Kanado, Korea Respubliko, Sud-Afriko kaj Usono) ĝuas 50 % rabaton.

ATENTU : Personoj el landoj, kiuj bezonas enirvizon por Slovakio devas indiki tion antaŭ la 30-a de aprilo 2004. Pli poste ne plu eblos trakti tion.

Kongresejo: Kiel kongresejo servos Kultura domo TRNAVKA en samnoma urboparto de Bratislava kaj parte ankaŭ la apuda hotelo PLUS.

Mi aliĝas al la 77-a SAT-kongreso en Bratislava (SK) kaj samtempe pagas/jam pagis la kongreskotizon laŭ la kotiz-tabelo EUR_______________per jena maniero :
* al la konto **s-kape** ĉe SAT
* al la konto **kape-p** ĉe UEA
* per SWIFT al la konto 2734847402227/0100 ĉe Komerĉni banka Praha
* per Eŭroĉeko **(ĉe lastaj du ebloj aldonante EUR 10 por la bankelspezoj)**

Nomo: Persona nomo: Naskiĝjaro: viro/ino

Kompleta adreso:

Tel.: Fakso: Rete:

Loko kaj dato: Subskribo:

La kongresejo:

Atentu: **okazis ŝanĝo** kompare kun la unuaj informoj ĉar la antaŭe anoncita kultura domo „Trnávka“ finas sian funkciadon.

La kongreso okazos en la **hotelo BRATISLAVA**, kie la kongresanoj ankaŭ povos loĝi. Temas pri tre bona tristela hotelo, kun sufiĉe granda kaj bela kongresa salono (320 sidlokoj). La hotelo troviĝas inter la aerodromo kaj la centro de la urbo, proksimume 10 minutojn da veturo de ambaŭ. Oni povas ĝin ankaŭ atingi per la urbaj trafikiloj, nome per la tramoj n-ro 8, 9 kaj 14, per la buso n-ro 50 kaj per la trolebusoj n-ro 201 kaj 202.



Hotelo "Bratislava"

La adreso de la hotelo: City Hotel Bratislava
Seberíniho 9
SK 820 12 Bratislava

Loĝebloj

Prezoj por 1 persono kaj por 1 nokto en eŭroj

	unulita ĉambro	dulita ĉambro	trilita ĉambro
Hotelo BRATISLAVA la prezo inkluzivas abundan matenmanĝon	48,--	29,--	ne estas
Studenta hejmo la prezo **ne inkluzivas** matenmanĝon	12,--	7,--	5,--

La prezoj de la tranoktado en la **hotelo BRATISLAVA** inkluzivas abundan matenmanĝon. La ceteraj manĝoj estas nedevigaj kaj aparte mendeblaj.



Tipa ĉambro en la hotelo "Bratislava"

Studenta hejmo estas en la rekta trama konekso kun la kongresejo – la veturo daŭras proksimume 25 minutojn, la tempa intervalo de la tramoj estas 12 minutoj. La prezoj **ne inkluzivas matenmanĝojn.** Duŝejoj kaj necesejoj estas komunaj en la koridoro, En ĉiu ĉambro estas fridujo. Kuirejo kun kuirilo estas komuna, manĝujaro kaj manĝilaro ne estas disponeblaj. La „unulita ĉambro“ estas fakte la dulita ĉambro rezervita por 1 persono.

KOTIZOJ - ABONOJ DE LA JARO 2004

NEPRE ATENTE LEGU LA ĈI-SUBAJN RIMARKOJN

* Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas SENNACIULON + ĝian jaran suplementon, S.R., kaj la dujaran SAT-Adresaron.
* El la indikita sumo, 40 % estas la kotizo, 60 % la abono.
* Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25j.) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
* Help- kaj grupmembroj pagas minimume la duoblon de la plena kotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.
* Samfamiliano de membro pagas la duonon de la plena jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekz. dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.
* Pagante la sumon aparte indikitan, nemembro povas aboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon «Sennacieca Revuo».

Landaj perantoj	Valuto	Kotizo + abono	Nura abono
Argentinio : Rodolfo Calogero, Namuncura 1749, AR- Q 8302 AOW Neuquen.	€	25,00	27,00
Aŭstralio: Bernie Heinze, 1 Marne Rd., Mount Evelyn, Vict.-3796. Reto: <franciska@bigpond.com>	AUD	88,00	99,00
Aŭstrio : Dr. Klaus Karner, Krebsbach 371, AT-6414 Mieming, pĉkt.-3799.466 (Oester. postsparkasse, Wien, konto 000-0025223-03)	€	50,00	55,00
Belgio : Jacques (Jakvo) Schram, 49 Hofter Bekestraat, BE-2018 Antwerpen. Reto: jakvo <Quiada@pandora.be> Poŝtkonto: 000-1692025-54	€	50,00	55,00
Bosnio-Hercegovino : Ivica Horvat,Zrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo	€	7,00	8,00
Brazilio : José Joaquin Lunnazzi, rua Manoel Antunes Novo 668, BR-13084-157 Campinas-SP. Rete: <lunazzi@uol.com.br>	€	20,00	23,00
Britio : Arthur Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex, CM13-1EJ (Tel.: +44.1.277.22.89.62) Rete: <arturo@signalprent.demon.co.uk>	GBP	34,00	37,00
Bulgario : Ivanka Stojanova, P.O.Box 701, BG-9000 Varna. Rete: <ivanka_esperanto@abv.bg	€	9,00	10,00
Ĉeĥio : Vlada Hasala, A.Dvoraka 1, CZ-69662 Straznice. Reto:<vlada_hasala@iol.cz>	CZK	580,00	630,00
Ĉinio : Wang Tianyi, Xi'an Esperanto-Asocio, Xiying-lu 74 Hao, CN-710054 Xi'an. Reto: <esp@pub.xaonline.sn.cn>	CNY	33,00	36,00
Danio : Ulrik Rasmussen, Nörregärdsvej 66, DK-2610 Rödovre.	DKK	400,00	450,00
Estonio : Freed Neeme, Kooli 6-26, EE-2240 Kehra.	EEK	100,00	110,00
Finnlando : Vakas	€	50,00	55,00
Francio : Pierre Quillaud, 16 rue du Lt.-Vaisseau Paris, FR-76120 Le Grand Quevilly, pĉk.-SAT Peranto n° 17 333 10 N, Paris. Reto:<quillaud.p.mt@wanadoo.fr>	€	50,00	55,00
Germanio : Jiri Proškovec, Heimbau Str. 10, DE-44143 Dortmund,Konto n° 4 907 664100, Bankkodo: 760 260 00 NORISBANK:. Reto: <proskovec@yahoo.de>	€	50,00	55,00
Hispanio : Pedro A. Hernandez Ubeda, c/Sainz de Baranda 44-3° D, ES-28009 Madrid. Konto: 2038 1787 406000178775 Tel. 912230692, Reto:<esperanto@mi.madritel.es>	€	32,00	36,00
Hungario : Béla Kovacs, Béla kiraly u.-44, HU-7400 Kaposvar. Ĝirkonto 11773432-04632175. rete: <espbela@axelero.hu>	HUF	1500,00	1600,00
Italio : Carlo Bourlot, Via Quarello 40, IT-10135 Torino(TO) Tel: 011-3970477 (vesp. ĝis 23h), Poŝtbanka konto n° 43976158. rete:<s.bourlot@tiscalinet.it>	€	48,00	52,00
Izraelio : Jehoŝua Tilleman, 97-A, Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin.	ILS	160,00	170,00
Japanio : Hiroyuki Tani, Syonai-Higasimati 3-4-2, JP-561 Toyonaka-si.-Pĉk.-00980-9-37624, SAT-Nihon. Reto: <tnhryk@pop07.odn.ne.jp>	JPY	8400,00	9300,00
Serbio-Montenegro : Ivan Moĉilnik, Pozeška 132, YU-11030 Beograd.	€	7,00	8,00
Kanado : Hans E. Ilginnis, P.O. Box 1133, Ladysmith, B.C. V0R 2E0, Kanado, bankkonto: Sennacieca Asocio Tutmonda CIBC, transit 540, Account n° 0747831; Rete:<hans@nanaimo.ark.com>	CAD	75,00	82,00
Kroatio : Zdenka Svetliĉiĉ, Matoševa 6, HR-10410 Velika Gorica, reto: <sat_hr@yahoo.com>	HRK	60,00	66,00
Latvio : Margarita Zelve, Rupniecibas 35+13, LV-1045 Riga-45	LVL	5,00	6,00
Litovio : Grazina Opulskiene, Tylioji 32-22, LT-5503 Mazeikiai, rete:<grazopul@yahoo.com>	LTL	22,00	24,00
Malagasio : Justine (Lala) Ralalarisoa, Lot IIC-72-FD Manjakaray,MG-101 Antananarivo. Bankkonto: ralalarisoa Justine, n° 010594738020000 BNI-CL 101 Antananarivo.	€	2,00	3,00
Nederlando : Corrie Kwantes-Kooij, Marnixstraat 57, NL-2023 RB Haarlem, pĉk. 2853752.	€	50,00	55,00
Norvegio : Per Engen, Østregate, NO-2300 Hamar.	NOK	410,00	450,00
Pollando : Elzbieta Janusz, ul.-Krowoderska 74/3, PL-31-158 Krakow, Bankkonto : BPH III O/Krakow 10601406-300001777438	PLZ	28,00	30,00
Portugalio : Manuel Luis Pedrosa Alves, Estrada Principal n° 79, PT-2710 -413 Morelinho-Sintra. Rete: <manuelalvespedrosa@clix.pt>	€	25,00	27,00
Rusio : Nikolao Gudskov, a/k 57, RU-105318 Moskvo, Reto: <nikolao@orc.ru>	€	8,00	9,00
Slovakio : Miro Zavodsky, Ĉsl.-brigady 67, SK-01004 Zilina-Zavodie.	SKK	440,00	480,00
Slovenio : Zlatko Tišljar, Inter-kulturo, Besednjakova 1, SI-62000 Maribor., Tel./fakso:+386.62.100.669	SIT	2800,00	3100,00
Svedio : Inga Johanson, Stampgatan 60.B.-127. SE-411 01 Göteborg, pĉk.-SAT c/o I.-Johanson, n°-26-63-22-7. Rete: <ishim@hotmail.com>	SEK	420,00	460,00
Svisio : Erna Döring, Klingelbergstrasse , CH-4056 Basel, pĉk.-40-43136-2.	CHF	86,00	94,00
Ukrainio : Dmitrij M.-Cibulevskij, a/k 9307, UA-310003 Ĥarkovo-3	€	8,00	9,00
Usono : Dan Glass, 7366 Park View Terrac, Mounds View, MN 55112., Reto: <dglass19@earthlink.net>.	USD	70,00	78,00
Aliaj ne jam menciitaj landoj			
Eŭropo +-S.Koreio	€	33,00	36,00
Cetero de la mondo	€	20,00	22,00

Karaj,
ankoraŭ ĉi-jare ni ne plialtigis niajn kotizojn, sed tio ne signifas ke SAT ne bezonas monon. Ja,la nombro de niaj membroj ne ebligas al ni komforte vivi kaj funkcii. Pro tio ni invitas vin varbi novajn membrojn kaj eventuale, tiu kiu povas, aldoni iom por subteni la agadon de SAT.

La P.K. de SAT